Bulteno de la

# Londona Esperanto-Klubo

2017
septembro-
oktobro

## Kluba Programo:

**septembro:**

1 Diskut-vespero – *Ĉu indas la revivigo de mortaj lingvoj?* (Ibis)

8 Filmo – *Mefisto (parto 2)* (Diorama) (1800h: konsilantaro)

15 Literatura vespero (Ibis)

22 John Wells – *Lingva Seminario* (Diorama)

29 Diskut-vespero – *Kiel elekti ĉefverkojn por lingvoj kiuj tion ne havas?* (Ibis)

**oktobro:**

6 Literatura vespero (Ibis)

13 Klubanoj – *Raportoj pri kongresoj kaj aliaj Esperantaj aranĝoj* (Diorama) (1800h: konsilantaro) (1800h: kurso)

20 Diskut-vespero– *La estonteco de Esperantlingvaj eldonoj* (Ibis)

27 Komuna vizito al restoracio – renkontiĝo 7ptm ĉe Pizza Express, London Wall – vidu detalajn apude

**novembro:**

3 Diskut-vespero (Ibis)


## Esperanta Kalendaro:

27 dec – 3 jan 2018: 16a Novjara Renkontiĝo, Saarbrücken, Germanio.
www.esperantoland.org/nr,
lu.esperanto@gmx.de
Vidu www.eventoj.hu/kalendaro.htm por ampleksa listo de renkontiĝoj.

*Bv. sendi informon al la bultenisto antaŭ 10a decembro por mencio en la sekva Kluba Bulteno.*

## Komuna vespermanĝo, 27-an de oktobro ĉe Pizza Express (Alban Gate)

**KIE?** Ĉe Pizza Express, 125 Alban Gate, London Wall, London, EC2Y 5AS. Ĝi situas SUPER kaj TRANS la strato London Wall, ĉe kruciĝo kun Wood St, sur la suda rando de la konstruaĵaro Barbican (vidu mapon).
Renkontiĝu je 7a horo vespere.




**PROKSIMAJ METRO-STACIOJ:**
Barbican, Moorgate, St Pauls. Aliaj apudaj: Bank, Cannon St., Liverpool St., Mansion House.

**BUSOJ** London Wall: 100, 388: Aldersgate: 4, 56, 153, 388 Beech St: 153 Cheapside:8, 25, 242 Moorgate: 21, 43, 76, 141
Pro strat-laboroj (precipe pro Crossrail), de tempo al tempo bushaltejoj fermiĝas kaj/aŭ busoj devojiĝas

**PROMENVOJOJ** (superstrataj): Pro konstru-laboroj, de tempo al tempo, oni fermas/devojigas kelkajn.

**SE VI INTENCAS PARTOPRENI**, bonvolu anonci vin antaŭ la fino de septembro al Arturo Prent: **01277 228962**,
**ap_esp-lek21@yahoo.co.uk**
(Poste restos ebleco, sed ne certeco, tamen bv informiĝi)

## Alia anonco:


La bultenisto ricevis (de Ian Fantom) informon, ke klubano Philip O'Fahey (aŭ, kiel li mem foje preferas laŭ ortografio irland-lingva skribi, O'Fathaigh) estas malsana. Li troviĝas nun en hospitalo en North Kensington, proksime al sia hejmo kaj ne for de apartamentaro Grenfell Tower, kie okazis lastatempe katastrofa incendio. Ŝajnas probable, ke Filipo devos bedaŭrinde resti en hospitalo dum tempo iom longa.

Kvankam malofte renkontata en kunvenoj de LEK, Filipo estas entuziasma subtenanto de Esperanto kaj daŭre klopodas plibonigi sian lingvoscion. Certe plaĉus al li se lin vizitus aliaj esperantistoj, des pli se tiuj estus konatoj malnovaj. Lia adreso estas: Room 3, Thames Ward, St Charles Hospital, Exmoor St, London W10 6DZ.
Vizithoroj finiĝas je 8:30ptm.

## Loko, horaro kaj aliaj informoj

Ni kunvenas vendredvespere, en iu el du lokoj:
Diorama Arts Studios, 201 Drummond Street, NW1 3FE (por kunveno kun programo);
Hotel Ibis, 3 Cardington Street, NW1 2LW (por malpli formala vespero)

Kutima programo ĉe Dioramo:
18:30 malfermiĝo kaj bonvenigoj
19:15 – 20:15 prelego aŭ alia ĉefprogramero
20:15 – 20:45 paŭzo
20:45 – 22:00 forumo, diskuto aŭ daŭrigo de la ĉefprogramero
22:00 fino




Loko:
Stacioj:
Metro: Euston, Warren St (linioj Victoria, Northern); Euston Square, Great Portland St (linioj Circle, Metropolitan, Hammersmith & City); Regents Park (linio Bakerloo)
Fervojo / London Overground: Euston
Busoj: 10, 14, 18, 24, 27, 29, 30, 73, 88, 134, 205, 390; krome: 453, C2 (Dioramo); 59, 68, 91, 168, 253, 476 (Ibis).

Kotizoj: £10 jare; fora membro: £6 jare.
Kluba retejo:
http://www.esperanto.org.uk/lek/lek.htm

Lokaj grupoj: Kingston: Roy Cliffe 020-8397 5895; Orientlondono: Roy Simmons 01473-461346 rokeby@globalnet.co.uk; Sudlondono: Gregory Porilo 020-8672 8095 esperanto-sleg@tiscali.co.uk.
Federacioj: Orienta: Roy Simmons (vidu supre); Sudorienta: Kevin Murray, 11 Leybourne Ave, West Byfleet, Surrey KT14 7HB 01932-345779 yarrump@gmail.com.

## Letero de nia Prezidanto



Karaj Klubanoj:

Mi raportetu pri nia junia ekskurso en Hyde Park. Unue, mi danku al **ARTURO PRENT**, kies antaŭaj esploroj ebligis tre lernigan kaj faktoplenan promenon. Liaj klarigoj kaj rakontoj ja multe pliprofundigis nian serpentumadon [tiele!] je diverstipaj pejzaĝoj - ĉar Hyde Park ja estas tia. La partoprenantoj ne nur admiris statuojn kaj monumentojn el kelkaj epoketoj. Ili ankaŭ ĝuis multspecajn akvobirdojn kaj mire observis arojn da sovaĝaj papagoj. La vetero estis nek tro varma nek tro malvarma. La ĉielo estis nek tro brila nek tro pluvminaca. La parko estis nek plenŝtopita de turistoj nek solece malplena de lokuloj. Ĉio estis en ordo por ni 11 LEKanoj, kiuj ĉeestis kaj gaje esperantumis.

Alia lastatempa kunveno tre sukcesa estis kartluda teama vespero en julio, ĉe Diorama, gvidata de **MATT PEPERELL**. Ludis 18 efektive, inkluzive kelkajn lernantojn, kiuj restis post siaj klasĉambraj lecionoj. (Parolante pri la kursoj kaj porkomencanta kaj porprogresanta, ambaŭ restas bonstataj kaj allogaj por la instruatoj.) La amike konkursa etoso de tiu Ludvespero evidente vigligis kaj certe ekzercis ĉiujn.

Aliloke, ĉe Hotelo Ibis, la Diskut-Vesperoj iĝas pli kaj pli diverstemaj. Aldone al la sperte gvidataj literaturaj rondoj, leviĝas iuj pri aktualaĵoj, iuj aŭtobiografiaj, iuj vizitant-centraj kaj iuj pli distraj. Ju pli metafore bunte, des pli interese en la longdaŭro, ĉu ne?

Nun oni atendas novaĵojn pri la rezultoj de la KER-ekzamenoj. Preskaŭ sendube la rezultoj estos gratulindaj, same kiel lastjare. Minimume, ni salutu la ĉi-jarajn studintojn kaj kuraĝigu la venontjarajn studontojn!

Tiom ŝajne sufiĉas por la momento. Intertempe, bonvole revenu de viaj Esperantujaj vojaĝoj kun raport-materialo por dividi inter viaj samideanoj ree en Londono!

Sincere,
*David Thornell*

Funkciuloj: Honora Prezidanto: Marjorie Boulton; Honora Vicprezidanto: Heleno Fantom;
Konsilantaro: David Thornell (Prezidanto kaj Sekretario), Matt Peperell (Vicprezidanto), John Wells (Vicprezidanto), Arturo Prent (Kasisto), Anica Page (Registristo), Renato Corsetti, Roland England, Stan Keable, Chris Lewis, Anna Lowenstein, Terry Page, Antony Rawlinson (Bultenisto).
Adresoj: David Thornell: lek.sekretario@gmail.com; Arturo Prent: 7 Walton Garden, Hutton, Brentwood CM13 1EJ ap_esp-lek21@yahoo.co.uk, Terry kaj Anica Page:7 Hampton, Gt Holm, Milton Keynes MK8 9EP terry_page@btinternet.com, anica_page@btinternet.com, Antony Rawlinson: 5 Thorpe Crescent E17 5BY acj.rawlinson@ntlworld.com.